# *Nicolás Maduro rifuzas hontindan dekreton usonan kontra? Venezuelo*



Karakaso, mar 6 (RHK) La prezidento de Venezuelo, Nicolás Maduro, rifuzis la “hontindan dekreton” emisiitan de la tiama prezidento Barack Obama, per kiu tiu lando sudamerika estis deklarita kiel ne normala kaj eksterordinara minaco por la nacia sekureco de Usono.

Maduro elstarigis ke la usona registaro elektis la 5-an de marto, tago kiam Venezuelo memoras la forpason de Hugo Chávez, por renovigi tiun ekzekutivan ordon. “Bonvenon, do, renovigu la dekreton”, li esprimis.

“Ni renovigas ?iutage la pretecon kaj moralon de batalo kiel bolivaraj kaj ?avistoj de la 21-a jarcento”, esprimis Maduro dum la ceremonio por memorigi la forpason de Chávez de anta? 7 jaroj.

La ministro pri eksteraj rilatoj Jorge Arreaza anka? rifuzis la renovigon  de la ekzekutiva ordo, kiu estas nur “pravigo por ?iuj agresoj kaj krimoj kontra? la homaro”, kiel la unuflankaj agresoj kaj punreguloj aplikataj de Va?ingtono ekde 2015.

La ministro taksis kiel “hondinta, malhonora kaj senracia” la akuzon ke Venezuelo povas esti “minaco nenormala kaj eksterordinara” por la nacia sekureco de Usono.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/216167-nicolas-maduro-rifuzas-hontindan-dekreton-usonan-kontrau-venezuelo

**Radio Habana Cuba**